Programkajero de PSUS-BG (2003), skanita.

**Akademio Internacia de la Sciencoj**

Accademia Internazionale delle Scienze

International Academy of Sciences

Internationale Akademie der Wissenschaften

Académie Internationale des Sciences

San Marino

# PROGRAMO

de la

## bulgara prova sanmarineca universitata studadsesio

(prov-SUS)

— Karlovo —

2003.09.17 – 23 / 1703 pfR

*Laborlingvoj · Lingue di lavoro · Arbeitssprachen · Working languages · Langues de travail*

***la Internacia Lingvo (ILo) • italiano • Deutsch • English • français***

*kaj la bulgara*

*Български – Blgarski*

# Programo

La loka organizanto de la prov-SUS estas la klerigejo de AIS en Bulgario, kun ties direktoro ADoc. Boĵidar Leonov.

## I. MALFERMO, FERMO

Malfermo de la prov-SUS okazos merkrede, la 17an de septembro, 17:00-17:30, kaj la ferma kunsido – marde, la 23an de septembro, 11:00-12:00, ambaŭfoje en la salono Boulanger.

## II. SCIENCAJ KURSOJ

La sekvaj kursoj – validaj je po unu studunuo – okazos ekde ĵaŭdo ĝis dimanĉo 18 – 21.09, en la sama tempointervalo. Kursfinaj ekzamenetoj okazos dimanĉe (21.09) vespere, en la samaj kurssalonoj.

### Sekcio: Filozofio (salono Eukleides)

F 01 OProf. Dr. habil. Helmar Frank, Paderborn (D)

**La filozofia fono de AIS**, 8:00–10:00

- *Kursfina ekzameneto: 18:30–19:00*

### Sekcio: Natursciencoj (salono Galilei)

N 01 OProf. Hans-Dietrich Quednau, Haag (D)

**Modeligo en la ekologio**, 10:00–12:00

- *Kursfina ekzameneto: 19:00–19:30*

N 02 OProf. K. Popov, ADoc. B. Leonov, ADoc. Mag. A. Lewanderska-Quednau,

**Ekologio kaj sano,** 14:00–16:00

- *Kursfina ekzameneto: 19:30–20:00*



## III. KANDIDATAJ FINEKZAMENOJ

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS (se ne jam havas la bezonatajn atestojn), inter kiuj minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, minimume unu devas esti el alia sekcio. Maksimume unu atesto povas esti pri lingvaj kursoj. Entute estas bezonataj 4 atestitaj kursstudunuoj.

En almenaŭ unu kurso (kaj en almenaŭ du – se ĉiuj studunuoj bezonataj por la fina ekzameno estas akirataj dum la SUS) la kandidato devas partopreni la kursfinan ekzameneton ricevante minimume la noton 6/10 (aŭ 7/10 ĉe kurso el la instruteko, ekzemple el la interreto).

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa, regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ *rifuzon havigi mankantajn erojn nur post la publika fina ekzameno aŭ pagendan rekompencon superantan la normalan ekzamenkotizon* pro la kromlaboro. Finan konstaton pri la plenumiteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado ĉe AIS oni ne plu ricevos pli ol du jarojn post la fina ekzameno. *Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventuale skribe fiksitaj kompletigpostuloj ne estos dum tiuj du jaroj plenumitaj* de la kandidato.

***Por eviti tiajn problemojn bv. ankoraŭfoje certiĝi, ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!***

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistreco, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazos l*a 22an de septembro* (lundo). La kandidatprelegoj estas publikaj. Buŝaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj – se necesas – okazos laŭ la afiŝota horaro.

La Ekzamenoficon por la jaroj 2000–2003 konsistigas

| | |
|---|---|
| Direktoro: | OProf. Carlo Minnaja dr. |
| Asistanto: | ADoc. Joanna Lewoc |
| sekcio 1 (kibernetiko): | OProf. Dr. habil. Reinhard Fössmeier |
| sekcio 2 (humanistiko): | AProf. Mag. Heinrich Dingeldein dr. |
| sekcio 3 (struktursciencoj): | OProf. Horst S. Holdgrün dr. |
| sekcio 4 (filozofio): | OProf. Dr. Helmut Angstl |
| sekcio 5 (natursciencoj): | OProf. Hans Michael Maitzen dr. |
| sekcio 6 (morfosciencoj): | OProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed. |

## Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

Ĉiu SUS-partoprenanto rajtas senpage enskribiĝi kaj sekvi kursojn (tion jam inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (la enskribiĝkotizo al kurso estas po 0,3 AKU, por ne-okcidentanoj malgrandigita je sesia rabato) oni ricevas oficialan ĉeestateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcese partoprenis la kursfinan ekzamenon. La ekzameno povas okazi en skriba formo, ekzemple laŭ la metodo de elektrespondoj aŭ de liberaj respondoj (se la respondo konsistas nur el nomoj aŭ nombroj), tiel ke sufiĉas la kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprimkapablo en la Internacia Lingvo. La kursfina ekzameno estas ripetebla.

Ankaŭ pri la *aŭdvidaj kursoj* ofertataj el la instruteko povas okazi ekzameno por studantoj, kiuj aŭ luprenis aŭ aĉetis la kurson, aŭ al ĝi enskribiĝinte (se ĝi estas ofertata) plejgrandparte sekvis ĝin dum SUS mem; atesto validas kiel pruvilo de akirita studunuo nur tiam, se la noto superas 6/10jn. La samo validas por kursoj ofertataj de AIS en la interreto.

## Prelegoj

La prelegkunsidoj estas gvidataj de la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ taskigitoj de ili. La partopreno en unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj okazas en ILo.

*Debutprelegojn* prezentas novalvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* — estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn (inkluzive diskuton kaj paŭzeton). La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projektakceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne: adopton) de titolo ĉe AIS.

Ankaŭ de liberaj ISKanoj (t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS) estas akcepteblaj t.n. *liberaj prelegoj* — pere de la dekano de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *koncizprelegoj* (10–20 minutaj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo — pere de la (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro de la koncerna sekcio. Temoj de kromaj koncizprelegoj ne surlistigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-ofico.



## Aliĝo

La aliĝilo estas havebla ĉe la Senata Sekretario, al kiu bv. ankaŭ resendi vian aliĝon (ADoc. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; blewo1@hrz.uni-paderborn.de). La aliĝformularon vi povas ankaŭ elpresigi el la interreto. Ĝi troviĝas sub la oficiala paĝo de la Protokolofico:

http://www.ais-sanmarino.org/Protokolofico

Tie, krom la elpresebla versio, ekzistas aldona ebleco aliĝi perrete — uzante la elektronikan formularon; ĉi lasta estas *senpere* vokebla ankaŭ per la adreso:

http://www.uni-math.gwdg.de/ILo/AIS/PPo/retaligxo-provsus.php

Bv. memori, ke aliĝoj ne estas prilaboreblaj sen laŭregulara reguligo de la aliĝkotizo. La SUS-aliĝo rajtigas vin

- partopreni publikajn oficialaĵojn kaj ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programbulteno aŭ SUS-ofico ne informas pri aparta pago,
- partopreni ĉiujn kursojn (sen rajto ekzameniĝi), prelegojn kaj finajn ekzamenigojn
- ricevi la programkajeron kaj, fine de la sesio, partoprenantarliston,
- ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon (por AIS-studentoj la insignon anstataŭas ilia aktuala legitimilo).

Bonvolu atenti, ke aliĝkotizo ne kovras ekzamenkostojn, kurskotizojn, tranoktkostojn ks., kaj ne estas transdonebla al alia persono.

La aliĝkotizo estas pagenda ankaŭ de *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj* (nepre *antaŭ* la limdato por anonciĝoj je *2003-04-16;* sen antaŭe konstatebla pago de la SUS-aliĝkotizo la ofertoj ne povas esti konsiderataj por la programo). La *kandidatiĝo por ekzameno* estas pritraktebla ankaŭ nur post la alveno de via SUS-aliĝkotizo.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t.e. ĝis la 2003-08-16) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. La kotizo estas pagebla laŭ la jenaj manieroj (bv. nepre indiki la pagocelon kaj nomon de la aliĝanto):

- al la AIS-konto n-ro 2051-305 ĉe Postbank Hannover (bank-kodo 25010030); Swift-kodo PBNKDEFF250
- al la AIS-konto n-ro 10801167-724225-27004-901001 ĉe Bank Pekao S.A., VI O/Łódź; Swift-kodo PKOPPLPWLDZ
- ĉeke — senpere al la trezoristo: Prof. B.-A. Wickström dr., Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin; *tiukaze bv. nepre aldoni 10€ pro la bankkostoj*

*(daŭrigo sur la paĝo 8)*

| | sekcio/salono | 8:00–10:00 | 10:00–12:00 | 14:00–16:00 | 16:00-18:00 |
|---|---|---|---|---|---|
| **MERKREDO**<br>2003-09-17<br>/1703 pfR | Boulanger | | | ekzamenofico<br>*(membrarkunsido)*<br>15:30-16 | ekzamenofico<br>*(konsultoj)*<br>16-16:30 |
| | Boulanger | | | | malfermo<br>17-17:30 |
| **ĴAŬDO**<br>2003-09-18<br>/1703 pfR | 4 Descartes<br>5 Galilei<br>6 Gandhi | F 01 Frank | N 01 Quednau | N 02 Popov k.a. | |
| **VENDREDO**<br>2003-09-19<br>/1703 pfR | 4 Descartes<br>5 Galilei<br>6 Gandhi | F 01 Frank | N 01 Quednau | N 02 Popov k.a. | |
| **SABATO**<br>2003-09-20<br>/1703 pfR | 4 Descartes<br>5 Galilei<br>6 Gandhi | F 01 Frank | N 01 Quednau | N 02 Popov k.a. | |
| **DIMANĈO**<br>2003-09-21<br>/1703 pfR | 4 Descartes<br>5 Galilei<br>6 Gandhi | F 01 Frank | N 01 Quednau | N 02 Popov k.a. | |
| **LUNDO**<br>2003-09-22<br>/1703 pfR | Boulanger | fin-<br>ekzamenoj | | | |
| **MARDO**<br>2003-09-23<br>/1703 pfR | Boulanger | | fermo<br>11–12 | | |

*Por viaj notoj:*



## La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentuloj:

**George BOULANGER** (1909–1982)

Fondinto (en 1957 j.) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 ILon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo AIS.

**René DESCARTES**, latine: Renatus Cartesius (1596–1650)

„La patro de moderna filozofio", kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Sian mekanikecan mondpercepton li aplikis eĉ en la psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en letero de la 20a de novembro 1629 j. al la benediktana scienculo Mersenne.

**EUKLEIDES de Aleksandrio** (ĉ. 365 – ĉ. 300 a.K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolomaios I ĉe la „Museion" en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj", aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko" kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

**Galileo GALILEI** (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksimodeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li ne plu verkis en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

**Mohandas Karamchand GANDHI** (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo" kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

**Jan Amos KOMENSKÝ**, latine: Johannes Amos Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

**Hermann SCHMIDT** (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

(daŭrigo el la paĝo 5)

Anoj de la Internacia Sciencista Kolegio povas pagi per sia individua konto (servobonhavo) ĉe la akademio. Se la stato de via servobonhavo ampleksas la necesan sumon, ne estas bezonata kroma ĝirado; la aliĝkotizo estos deprenita aŭtomate post via anonciĝo al la sesio.

Tiuj dumvivaj subtenaj membroj kaj AIS-studentoj posedantaj validan studentan AIS-legitimilon akiritan antaŭ la 20a SUS estas liberigataj de la aliĝkotizo, kiuj aliĝas *minimume unu monaton* antaŭ komenco de la studadsesio al la Senata Sekretario; alikaze estas krompagenda 0,2 AKU.

Personoj, kiuj intencas ekzameniĝi ĉe AIS, povas ricevi studentan legitimilon (la finekzamenantoj devas aŭ posedi aŭ esti posedinta la legitimilon kun la celata scienca grado). Ĝi validas ĝis la atingo de la studadcelo, sed ne pli longe ol 5 jarojn, kaj estas akirebla kontraŭ 0,5 AKU ĉe la Senata Sekretario ankaŭ dum la sesio mem. Interesatoj bv. disponigi sian aktualan foton (ĉ. 2 x 3cm).

## Karlovo

Bonvolu memstare aranĝi vian restadon. Helpon vi povas ricevi de la lokaj organizantoj, pere de ADoc. Boĵidar Leonov dipl. pat. ing., ul. Tsar Assen 7, BG-4300 Karlovo, tel. +359-335/3933 (priv.), +359-335/4947 (deĵ.), leonov@rozabg.com

## Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj ĝenerale en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU valoras nun 65 EUR. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio (ITK) de AIS havas individuan subkonton („servo-bonhavon“), de kiu eblas i.a. senkosta ĝiro al aliaj individuaj AIS-kontoj kaj pago al AIS.

Al servobonhavoj estas aŭtomate alkalkulataj honorarioj (ekzemple pro la laŭregulare realigita kurso aŭ prelego akceptita por la antaŭe presita programo), aŭtomate dekalkulata estas la jarkomence pagenda membrokotizo. Kromaj dekalkuloj okazas laŭ sciigo de la servobonhavo-posedanto (ekz. aliĝkotizoj), se la kontostato tion ebligas.

Ĉe la SUS-oficejo ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monsistemoj. Ĝenerale estas akceptataj enpagoj nur en eŭro.



## Senato kaj senataj oficoj 2000–2003

### ▶ Senatano pri publikaj rilatoj kaj informado; direktoro de la informofico

**OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER** *(Vicdirektoro: OProf. H.-D. Quednau)*
Rahel-Straus-Weg 19, D-81673 München; info@ais-sanmarino.org

### ▶ Senatano pri akademia identeco, direktoro de la identecofico; prezidanto

**OProf. Dr. habil. Helmar FRANK**
Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn; hfr@uni-paderborn.de

### ▶ Senatano OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.

Mathematisches Institut der Universität, Bunsenstr. 3–5, D-37073 Göttingen
holdgrun@uni-math.gwdg.de

### ▶ Senatano pri publikigo kaj protokolado; direktoro de la publikig- kaj protokol-ofico; Senata Sekretario

**ADoc. Mag. Joanna LEWOC** *(Vicdirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr. membro: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)*
Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; blewo1@hrz.uni-paderborn.de

### ▶ Senatano pri honorado; direktoro de la honoradofico

**OProf. Hans Michael MAITZEN dr.**
Institut für Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien; maitzen@astro.univie.ac.at

### ▶ Senatano pri ekzamenoj; direktoro de la ekzamenofico; vicprezidanto

**OProf. Carlo MINNAJA dr.** *(Asistanto: ADoc. Mag. Joanna Lewoc, membro: OProf. Horst S. Holdgrün dr.)*
Dipart. di Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova, minnaja@libero.it

### ▶ Senatano pri la akademia strukturo; direktoro de la strukturofico

OProf. Carlo MINNAJA dr. *(Vicdirektoro: OProf. Hans Michael Maitzen dr.)*

### ▶ Senatano pri esplorado kaj evoluigado; direktoro de la sciencofico

**OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.** *(Vicdirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)*
Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; fabrizio.pennacchietti@unito.it

▸ **Senatano pri studado; direktoro de la klerigofico**

OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr. *(Vicdirektoro: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)*
Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, D-85354 Freising;
quednau@lrz.tu-muenchen.de

▸ **Senatano pri financoj; direktoro de la financofico; trezoristo**

OProf. Bengt-Arne WICKSTRÖM dr. *(Vicdirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)*
Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin;
trezoristo@ais-sanmarino.org

## SEKCIOJ KAJ FAKAROJ DE AIS

### *Kibernetiko* Dekano: OProf. Klaus Weltner dr.

Schumannstr. 57, D-60335 Frankfurt; weltner@em.uni-frankfurt.de

1.1. **Antropokibernetiko** (psikokibernetiko, lingvokibernetiko, klerigkibernetiko, kibernetikaj komunikada kaj dokumentada sciencoj, socikibernetiko, ekonomikibernetiko)

1.2. **Ĝenerala kibernetiko** (teorio de informacio kaj kodigo, teorioj de algoritmoj, logikaj ŝaltretoj, abstraktaj aŭtomatoj kaj adaptivaj (celorientitaj) sistemoj, teoria informadiko, komputil-arkitekturo, ĝenerala teorio de retrokuplado kaj reguligo, teorio de strategiaj ludoj)

1.3. **Inĝeniera kibernetiko** (maŝina aŭ inĝeniera kibernetiko [teknologioj de telekomunikado, de informstorado, de reguligo, de komputiloj kaj de aŭtomacio, aplikata informadiko])

1.4. **Biokibernetiko** (genetiko, neŭrofiziologio, teorio de retrokuplado en organismoj, kibernetika medicino, komunikado kaj konduto de bestoj)

### *Humanistiko* Dekano: OProf. Fabrizio Pennacchietti dr.

Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; fabrizio.pennacchietti@unito.it

2.1. **Bazaj neparametraj antroposciencoj** (neparametraj psikologio, lingvistiko, klerigscienco, komunikada kaj dokumentada sciencoj)

2.2. **Soci-sciencoj neparametraj** (neparametraj pedagogio, administraci-scienco, sociologio, ekonomiko, etnologio, jurscienco, politologio)

2.3. **Artsciencoj neparametraj** (muzikologio kaj muzikhistorio, estetiko kaj historio de la porvidaj artoj, literaturscienco (speciale beletriko), estetiko kaj historio de la scenejaj artoj)

2.4. **Integraj kultursciencoj** (etnologio, socigeografio, kulturgeografio, kompara religiscienco, religihistorio, ekonomi-historio, ĝenerala historio, bibliotekscienco)

### *Struktursciencoj* Dekano: OProf. Horst S. Holdgrün dr.

Mathematisches Institut der Universität, Bunsenstr. 3–5, D-37073 Göttingen;
holdgrun@uni-math.gwdg.de

3.1. **Pensadstruktursciencoj** (simbola logiko, teorio de (mal)precizaj aroj, ĝenerala aksiomatiko, aritmetiko, nombroteorio, probablokalkulo, matematika statistiko, matematikdidaktiko)

3.2. **Imagadstruktursciencoj** (geometrio, kinematiko, ĝenerala sistemiko)



3.3. **Formalaj matematikaj sciencoj** (algebro, teorio de serioj, funkcioj, ekvacioj, distribucioj ktp., kalkuloj de vektoroj, matricoj, diferencialoj, integraloj, ĝenerala strukturteorio)

### *Filozofio* Dekano: OProf. Dr. Helmut Angstl

Betschartstr. 14, D-81243 München; Helmut.Angstl@t-online.de

4.1. **Filozofiaj bazosciencoj** (filozofia logiko, ontologio, semiotiko, ĝenerala modelteorio, epistemologio)

4.2. **Filozofiaj valorteorioj** (filozofia estetiko, aksiologio, moralfilozofio, jurfilozofio, ŝtatfilozofio)

4.3. **Metasciencoj** (historioj kaj filozofioj de la unuopaj sciencoj kaj sciencobranĉoj, idehistorio, historio de la filozofio, historio de la unuopaj sciencoj)

### *Natursciencoj* Dekano: OProf. Hans-Dietrich Quednau dr.

Forstwiss. Fakultät, Am Hochanger 13; D-85354 Freising; quednau@lrz.tu-muenchen.de

5.1. **Substancikoj** (fiziko, fizikaj teknologioj (konstrustatiko, mekanika teknologio, elektroteknologio, maŝinkonstruado), kemio, kemiaj teknologioj)

5.2. **Mondikoj** (geosciencoj kaj astrosciencoj [astronomio, meteorologio, geodezio, naturgeografio, geologio, paleontologio])

5.3. **Biosciencoj** (ĝenerala biologio, biometrio, botaniko, zoologio, klasika (t.e. bio-)ekologio, humanbiologio.);
*Departemento pri medicino (medicino, bestomedicino, farmacio, nutradscienco)*

### *Morfosciencoj* Dekano: (komisiite) OProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed.

Sylter Weg 11, 33102 Paderborn, blobi1@hrz.upb.de

6.1. **Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado** (sonstudioteknologio, grafika teknologio, sportscienco, filmstudioteknologio, sciencaj fotado, filmado, surbendigo ktp., muzeologio, parolteknologio, retoriko)

6.2. **Ilar-morfologio** (ergonomiko, formigo de industriaj produktoj, laborformteknologio, formigo de laborlokoj)

6.3. **Mediplanado** (arkitekturo, ĝardenformigo, agronomio, urba kaj regiona planadoj, trafikplanado, ĝeneraligita homo- kaj natur-ekologio, turismiko)

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

*La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo de AIS bezonas la antaŭan permeson de la (vic)prezidanto aŭ de la direktoro de la Subtena Sektoro. Dum la sesio bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la SUS-oficejo anoncatajn sur la speciala afiŝejo.*

© Kopirajto: AIS.
*Stato: 2003-08-18/1702pfR* (PPO/jl)
Prezo de la programo: 0,02 AKU (senpaga ekzemplero al aliĝintoj)